FN PER ANC 47


# NORMANDA ESPERANTO - BULTENO

BULLETIN TRIMESTRIEL - TRIMONATA BULTENO

N° 22 - DECEMBRO 1972



Redaktas : Sro E. JOUIS 621, rue Georges Mugnier
- 76 - BOISGUILLAUME -


Sendu la manuskriptojn antaŭ la :
10a de Februaro, 10a de Majo - 10a de Aŭgusto - 10a de Novembro

## ENHAVO


- Ĉu ni povas esperi ?
- Elekto de la estraro
- Ni funebras
- Vivo de la Grupoj


## - ĈU NI POVAS ESPERI ? -

En nia lasta numero, ni konstatis kun bedaŭro, ke en nia Normanda Unuiĝo mankas vigleco, agemo. Post tiu konstato okazis ĝojiga kaj kuraĝiga fakto : la Havra Grupo proponis okupiĝi komune pri la Bulteno dum unu jaro kaj sugestis, ke ĉiuj grupoj laŭvice akceptu tiun taskon. Tiel, ĉiuj grupoj devus zorgi pri tio ĉiun sesan aŭ sepan jaron dum nur unu jaro.

Tiu propono montras, ke nia asocio ankoraŭ estas kapabla trovi solvojn al la problemoj eĉ gravaj; kaj mi ne dubas ke la Grupoj, kiuj povas, bonvolos doni sian helpon al la realigo de tiu projekto.

Bedaŭrinde..... ni ne devas tro rapide ĝoji pri la vigleco de nia Unuiĝo! Efektive, dua fakto venis poste malpliigi la impreson de reviviĝo kiun mi havis je ricevo de la ĉi-supra informo. Tiu fakto estas ke, el 150 personoj proksimume, ricevantaj nian Bultenon, nur 30 personoj partoprenis en la voĉdono por elekti la novan estraron. Nur 20% !

.../...

...... Se oni aldonas, ke la pli multo de la grupoj forgesis sendi ĝustatempe la raporton pri sia vivo, mi devas konstati ke la situacio kvankam pli bona ankoraŭ ne estas tute ideala ! !

Tamen leviĝis iom da espero. Ni ĝoju, sed ankaŭ laboru, por ke tiu espero grandiĝu kaj realiĝu.

P. POTTIER.

---

ELEKTO DE LA NOVA ESTRARO
-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

Nur 30 personoj sendis sian voĉdonilon.

La voĉnombrado okazis en Yvetot la 7an de Novembre 1972, en ĉeesto de 4 membroj de la antaŭa estraro, kaj donis la jenan rezulton.

Estis elektitaj :

- Sro E. JOUIS
- Sino LAVALLEE
- Sro LEGRET
- Sro LEMARCHAND
- Sro POTTIER
- Sro TAILPIED
- Sro MARTIN

Ĉar Sinjoro Legret poste rifuzis sian elekton, Sinjoro Quillaud, kiu venis tuj post la elektitoj, estas elektita anstataŭ li.

Sinjoro Pottier tuj sendis demandaron al la nova estraranoj por decidi, per letere, pri la postenoj de la novaj estraranoj sed ĝis nun nur kelkaj respondoj revenis. Ni do, informos vin pri tio en la venonta bulteno.

---

ĈU VI SCIAS ??
=:=:=:=:=:=:=:

.... ke la libro " Retoriko " de Lapenna estas tradukita en la polan lingvon .....

(el Heroldo)

## NI FUNEBRAS -

Per la lasta numero de " Franca Esperantisto ", malĝoje ni sciiĝis de la morto de Fraŭlino PAULIER, la afabla, la sindonema sekretariino de U.F.E.

Ni kuniĝas al la multaj geamikoj de Fraŭlino PAULIER por sendi nian kondolecon al Unuiĝo Franca por Esperanto.

Y.L.

---

Sinjoro Léon TRUFFART, emerita farmaciisto en Aumale (Seine-Marit.) tre fidela Esperantisto, lasis nian teron la 20an de Novembro I972a. Li estis en sia 87a jaro. Sro Jouis vizitis lin antaŭ kelkaj jaroj, en sia bela domo, I4, rue aux Juifs, malantaŭ la farmacio kiun li estris antaŭe. Dum multaj jaroj, Sinjoro Truffart estis Delegito de UEA. Li ankaŭ fariĝis dumviva membro de U.N.E.
La enteriga meso okazis la 23an de Novembro en la preĝejo St Pierre-St Paul en Aumale. La Normanda esperantistaro perdas bonan, fidelan anon. Ni memoru pri li.
Sinjoro Bosc reprezentis la Esperantistaron ĉe la funebra ceremonio.

E.J.

---

## ĈU VI SCIIAS ??
:=:=:=:=:=:=:=:

.... ke Josip Bronz TITO, prezidento de Jugoslavio, kiu lernis Esperanton antaŭ 40 Jaroj, estos la Alta Protektanto de la 58a Universala Kongreso en Beograd .......

.... ke Australio eldonas novan filmon esperantlingvan, fare de la Australia Registara Buroo por Informado ...

.... ke, okaze de lia vizito al Parizo, Edward ĜIEREK, sekretario de la Pola Laborista Partio, ricevis la libron de Pierre Delaire " La Dolĉa Francio" kiel donaco de la Nord-Franca Federacio. .........

(el Heroldo)

# V I V O   D E   L A   G R U P O J

## - V I R E -

Kiel ĉiujare, mi vizitis Kastelon de Grésillon en lasta julio dum unu semajno. Antaŭ dudek jaroj fondiĝis la Kulturdomo, pro tio, la urbestraro de Baugé estis akceptata de la estroj de la Kastelo, je la 27a de julio. Pri tiu ceremonio, raportis amplekse kaj simpatie la regiona ĵurnalo " Courrier de l'Ouest ". Neatinde estas ke ĉe la vojoj kondukantaj al urbo Baugé staras nun reklam-tabuloj, inter ili troviĝas la skribaĵo " Centre Espérantiste ", kiu ĝijigas nin. Pro tiu skribaĵo, kelkaj neesperantistoj vizitis la Kastelon.

La Kulturdomo estis plena, en ĝi kuniĝis ĉirkaŭ sepdek personoj el multaj landoj, eĉ el Japanio, tri ĉarmaj knabinoj.

Kiel kutime, okazis interesaj prelegoj diverstemaj (polucio - Japanio - lingva demando en Belgio ) filmoj esperanto-parolantaj, ludoj, ĥorkantado. Ankaŭ estis faritaj la kutimaj ekskursoj al Loire-Kasteloj, Angers, L[illegible] (sono kaj lumo). Kun plezuro, mi revidis la " dolĉajn ", [illegible]ciajn pejzaĝojn de Anjou.

Kiel kutime, regis en la Domo tre agrabla, familieca etoso.

A. LEGRET -

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

## - F E C A M P -

La Grupo ĉiam vivas !!!!

Sinjoro PERMANNE gvidas unua-gradan kurson, kun tri gelernantoj. -

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

## ĈU VI SCIIAS ??

:=:=:=:=:=:=:=:

.... ke la ŝtata tu[illegible] entrepreno bulgara " Balkanturist " organizos, fine de Ju[illegible] 73, ferio-programon " Ripozo kaj sano " je favoraj prezoj kaj kondiĉoj por la Esperantistoj el ĉiuj landoj ......

(el Heroldo)

## - Y V E T O T -

La Grupo organizis ekspozicion en la Junuldomo la 25an kaj la 28an de Oktobro. Krom la esperantistoj, nur IO personoj proksimume vizitis ĝin. La informa vespero ricevis nur la viziton de la lokaj Esperantistoj, kaj neniu lernanto tiam aliĝis al la kurso.

Tamen, dum la ĝenerala kunveno, kiu okazis la I8an de Novembro, unu nova lernantino anonciĝis. Post rapida nova inforkampanjo, la kurso komenciĝos la 25an de Novembro kun minimume I lernantino, sed eble pluraj.

Lastminute. 3 lernantinoj partoprenis la Unua-gradan Kurson, ĝi okazos ĉiu sabato, je la I4horo kaj duono, al la Junulardomo.

La Grupo decidis organizi komunan mangôn en TROUVILLE-ALLIQUERVILLE, la I7an de Decembro, okaze de la naskiĝdato de Dro Zamenhof, kaj Reĝofeston la I4an de Januaro kun disdono de ludiloj por la infanoj de la Yvetotanoj.

---

- ....YVETOT - anoj : ne forgesu pagi vian kotizon al Normanda Unuiĝo kaj al via Grupo ! Antaŭan dankon.

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

## - L E   H A V R E -

Fine de Junio, okazis sesio de " Atesto pri lernado ". 6 Junaj gelernantoj sukcesis.

La 4an de Oktobro, okazis la ĝenerala kunveno de la Grupo. Jen la nova estraro : Prezidantino Sino Peltier
Sekretariino " Turmel
Kasistino " Langlois
Bibliotekistino " Mercier

aliaj estraranoj : Sinoj Colleu - Lavallée - Lucas -
Sroj Gibaux - Chalm - Laney -

---

## ĈU VI SCIIAS ??

.... ke la havra publiko havas sancon : montrofenestro, 8, Place Albert René, informas la preterpasantojn pri la Internacia Lingvo .........

La kursoj kiuj funkcias en Le Havre estas :

- Ia grada : gvidata de Sinjorino Colleu (en liceo)
- "-" : "-" Sinjoro Chalm (vidu ĉi-sube)
- 2a grada : "-" Sinjorino Lucas (dome)
- "-" : laŭvice gvidata de Sino Colleu, Sroj Gibaux, Noël, kaj Mary (vidu ĉi-sube)

Ĉe la " Maison des Jeunes et de la Culture " (M.J.C)
- en Le Havre, rekmetoda kurso funkcias, gvidata de nia dinamika amiko, Aleno Chalm, respondeculo de la fako " Esperanto ". Oni notas alfluon de gratulkartoj el eksterlando. Jam ekokazas interŝanĝon de objektoj kun aliaj landoj per Esperanto.
- ĉe la lernejo " Lycée de la Porte Océane ", la malnovaj kaj la novaj esperantistoj en Le Havre refreŝigas sian konon pri la lingvo. La lecionoj, alterne prizorgataj de malsamaj gvidantoj, celas al revido kaj praktikado. Avantaĝo en tiu aranĝo estas ke malesto je unu leciono ne gravas; nura kondiĉo : jam esti studinta Esperanton dum unu jaro. Ĉiuvendrede je la 18a 30. Klaso 220.

---

La Grupo kunvenas ĉiumonate; plue, la gejunuloj, ne multaj sed persistaj gesamideanoj, grupiĝis kaj havas regule kunvenojn pri siaj propraj aktivecoj.

---

La havra reĝo-festo okazos la IIan de Februaro, en la ĉambro " Cahard ", rue Dr Richard. Ni plezure invitas vin.

---

ĈU VI SCIIAS ??
:=:=:=:=:=:=:=: .... ke Pola radio organizas novan konkurson ?

(Itala samideano gajnis la antaŭan konkurson : vojaĝo al Pollando.
(Pluraj grupanoj en Le Havre provis la konkurson : unu el ili
(gajnis belan artan memoraĵon.) Petu informoj al : Esperanta Redakcio de la Pola Radio. - P.K. 46 - Varsovio - Pollando -

(el Heroldo)

## ALVOKO DE LA PREZIDANTINO

Post la somera ripozo, ĉiu devas nun zorge organizi sian aŭtunan agadon : informadon per ekspozicioj, filmvesperoj, prelegoj, afiŝoj, flugfolioj, malfermon de kursoj, grupigon de novaj membroj, konversaciajn rondojn, artikoloj....

Ciu devas ankaŭ sin prepari por la Esperanto-renkontoj en I973 :

- federacia kongreso en Parizo (29/4/73)
- nacia kongreso en Luksemburgo (Pentekosto)
- U K en Belgrade (28/7 - 4/8/73)
- infankongreseto en Belgrade por infanoj 6-I3 jaraj (samaj datoj)

Pli precizaj informoj aperos en la venonta bulteno.

La lasta konsilia kunveno de UFE decidis tre modere pli-altigi la kotizon. Nun : 38 F. (membroj abonantoj), 23 F. (malpli ol 22-jaruloj), 8 F. (simpatiantoj).

Pagu vian kotizon al federacia kasistino, indikante vian naskiĝdaton kaj profesion.

Bonan kuraĝon al ĉiuj : J. Vincent.

## TRA LA FEDERACIO

- en Domfront...... : kio okazas ?
- en Evreux........ : sama demando
- en Fécamp........ : id.
- en Le Havre...... : id.
- en Les Andelys... : malfermo de duagrada kurso vendrede en la junulcentre kaj de triagrada ĵaŭde en lernejo; prelego pri "La vivo en okcidenta Usono" la 5-an de novembre en la urbdomo; tagmanĝo en Hotel de Paris la 11an de novembre; libroekspozicio meze de decembro.
- en Lisieux....... : ?
- en Vire.......... : ?
- en Yvetot........ : la grupo nun vigle informas la loĝantaron pri la baldaŭa malfermo de la kursoj.

Kiel vidas, mankas multaj informoj. Tamen, mi esperas kaj insiste petas, ke ĉiuj ricevintoj respondu la demandarojn senditajn de UFE kaj transdonitajn komence de oktobro de la federacia sekretario.

## INFORMOJ

I°) Sciu ankaŭ, ke ni havas en stoko la libreton "Une langue internationale commune à toutes les nations du monde ". Tiu libreto en franca lingvo tre taŭgas por la informado. Prezo : 2,50 F. Mendu de S^ro Pottier.

2°) Ĉu vi petis de via librovendejo "Je parle Esperanto ", el la serio Marabout-Flash N° 345 (3,50 F.). Ĝi estas riĉenhava, plaĉe prezentita, unuaranga disdonaĵo.

3°) En Paris, de la I9a de Oktobro ĝis la I7a de Decembro, okazas ekspozicio pri "La arto de Onisaburo kaj de lia skolo " en la muzeo Cernuschi 7,av. Vélasquez - Paris - 8ème - métro Monceau.

.../...

..... Enirprezo : 4 F. Tiu ekspozicio estas aranĝita de Sro Umeda kun helpo de parizaj esperantistoj. Nepre vizitu ĝin okaze de vojaĝo al la ĉefurbo. Malfermita ĉiutage escepte marde, de la I0a ĝis la I7a 30.

4°) Ekzamenoj : por peti kaj sendi provojn, mendi programon aŭ gvilibron, aŭtentigo de diplomoj, turnu vin al Sino Vincent, nova direktorino pri la ekzamenoj de la Franca Esperanto-Instituto.

---

## KOTIZOJ, ABONOJ I973

Aktiva esperantisto subtenas sian movadon, pagante kotizon al la nacia organizo. Samtempe, li fariĝas membro de la internacia. Li perfektiĝas legante revuojn kaj librojn. Rimarku la tre favoran prezon por gejunuloj, kaj pagu al : Fédération Normande des Centres Culturels Esperanto. CCP Rouen 2348 06 Z, kiu transdonos. Same, ni povas transsendi viajn abonojn.

**Kotizoj**

| | |
|---|---|
| UFE : | |
| membro simpatianto | 8,00 |
| "-" abonanto | 38,00 |
| "-" "-" (- 22-jara) | 23,00 |
| "-" donacanto | 57,00 |
| dumviva membro | 760,00 |
| (la 4 lastaj ricevas " Revue Française) | |

**Abonoj**

| | |
|---|---|
| Heroldo | 3I,00 |
| Kulturaj kajeroj | I0,00 |
| (bonfaranto) | I5,00 |
| Norda prismo (Liter.) | I9,00 |
| Homo kaj kosmo | 9,00 |
| Oomoto | I0,00 |
| El Popola Ĉinio(Ijaro) | 6,00 |
| 2 jaroj 9 F.-3 j. I2 F) | |
| Kontakto | I3,00 |

ATENTU ! La membroj, kiuj pagas nur 8 F. ne rajtas aktive partopreni en la movado, nek voĉdoni dum la federacia kongreso, nek aprobi aŭ ne la agadon de la nacia asocio. Ĉiuj aliaj membroj, pli ol I8 jaraj, rajtas tion fari.

La federacia komitato kunsidis en Rouen la [illegible] de Oktobro en ĉeesto de Groj Bonnet - Jouis - Pottier - [illegible]pied - Vincent -, Krome, Sro Pottier havis la plenpovon de Sro Colleu kaj Sino Vincent tiun de Sro Véron. Sekve, la komitato povis plenefunkcii kaj alprenis la jenajn decidojn :

I°) eldono de federacia poŝkarto - 2°) helpo al fonduso-domo (vidu la specialan alvokon) 3°) informado : la grupoj raportu pri sia vivo en la lokaj gazetoj kaj sendu la detranĉitajn artikolojn al Sro Bourdeaux ĉe UFE, 34, rue de Chabrol Paris . 4°) organizo de seminario por grupestroj en Caen (3-8/9/73). Pri tiu lasta punkto , la interesuloj bonvolu jam nun principe sin anonci al la sekretario por ke ni havu ian ideon pri la nombro da partoprenontoj kaj serĉu taŭgan ejon.

FONDUSO DOMO : Por forigi la tere altan luprezon de sia pariza sidejo, UFE jam de longe decidis aĉeti propran oficejon. La normanda federacio volonte akceptos iun ajn sumon por helpi al tiu necesa aĉeto. Listo de la donacintoj aperos en la venonta bulteno, se ne estas indikite kontraŭordono.

---

La informoj koncernantajn la federacion oni sendu al la prezidantino KIAM AJN. - Sino VINCENT - rue des Oiseaux 27700 LES ANDELYS

---

BONVOLU PARDONI AL NI TIUN NE TRE BONAN PREZENTON

La havra taĉmento !